

TEA-BULTENO

24A JARO - N°157 MARTO - APRILO N. 3-4/2021

Estas personoj, kies aĝo blankigas la hararon, sed tute ne skrapĉizas la koron,
kiu restas tute freŝa kaj juna kaj ĉiam per la sama forto batas por ĉio bela kaj bona.
Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917)

Kara Legantaro!

Certe vi jam enfalis en malesperon pro la ega malfruiĝo de la triesta informilo, eble jam ekpensis pri ĝia definitiva malapero!

Sekigu do viajn larmojn kaj trankviliĝu, ne tiel estas; temis nur pri momentaj problemoj kiuj bonŝance nun foriĝis.

Printempo jam komencis disdonaci burĝonojn, helverdan foliaron, florojn al arboj, arbustetoj kaj herbejoj, kio unuvorte plivarmigas niajn korojn. Kaj same kiel Naturo renaskiĝas, ankaŭ niaj animoj devas revekiĝi, ĵeti malhelecon malantaŭ la ŝultrojn, malfermiĝi kuraĝe kaj senhezite al la ĉirkaŭa mondo kaj ree alfronti firme kaj decide la vivon malgraŭ la ankoraŭaj malfacilaĵoj kaj malbonaĵoj.

La esperantista komunumo elmontris sin kapabla reagi al malfavoraj cirkonstancoj, ĉefe al tiu senigo de renkontiĝebloj fizikaj, interpersonaj, laboregante per ĉiaj eblaj teknikaj rimedoj je dispono. Danke al tiu ampleksa penado oni sukcesis konkretigi kongresojn, seminariojn, kursojn, koncertojn ktp, en kiuj partoprenis centoj kaj centoj da samideanoj. Jes, ĉio estis virtuala, tamen ne gravas ĉar oni ne plu sentis sin izolita, sed ĉiam parto de la aktiva kaj aganta Esperanto-movado.

Ĝis kiam la endemio devigos nin restadi propraloke, neniu scias..., sed ni same ekpretu je ĉeesto, reala aŭ virtuala laŭ la cirkonstancoj, en la planitaj eventoj; aliĝu al la antaŭvidita kongreso/seminario kaj fine plenĝuu la eksterordinaran amikecan etoson, karakterizantan ekde ĉiam niajn kunvenojn. Nia Lingvo, kiu sukcesis releviĝi post la du mondaj militoj, ja superados ankaŭ ĉi katastrofan, ŝajne senfinan, atakon de danĝera viruso, kiu, malgraŭ siaj disvastiĝpovo kaj altgrada infektado, neniam kapablos silentigi nin!

Havu agrablan tempon en unu aŭ pluraj okazontaĵoj tra la mondo! Deziras tutkore

Via redaktanto Elda

Kelkaj el la retprogramoj ĉeestindaj kaj ĉeestendaj en marto kaj aprilo 2021

Kion vi ŝatus partopreni?

Navigu en https://eventaservo.org/ kaj mem elektu inter la multaj programeroj.

Kontrolu bone la horaron, laŭ via hor-zono!

Iuj el la diversaj proponoj:

KONTRAŬIZOLIĜO - Sabato, 20 marto

Ĉiusabata kunveno pri socia respondo dum la kronvirusa epidemio - Kundivido de spertoj el malsamaj landoj

PRINTEMPA FESTO DE ESPERANTO EN FRANCIO - Sabato, 20 marto - Reta bunta kultura programo organizata de Espéranto-France.

INTERNACIA LIBERA POLIGLOTA BABILADO EN ESPERANTO, LA ANGLA, HISPANA, ITALA, FRANCA JAPANA KAJ ALIAJ LINGVOJ - Sabato, marto 2021 - Potigvara Esperanto-Asocio kaj Brazila Poliglota Klubo invitas al poliglota babilado!

PAROLU KUN NI ESPERANTE - POR ĈIUJ NIVELOJ Dimanĉo, 21 marto 2021 - Halifakso, Kanado

NI LUDU VERDA ŜTELO PER INTERRETO - Lundo, 29 marto - Ni kune ludos la vortludon Verda Ŝtelo per retpaĝo kaj samtempe babilos per *Jitsi*.

JÜRGEN WULFF: DIRITE NE SIGNIFAS FARITE (2) - LA DEMONOJ EN NI MEM: KIAL NI NE KOMENCAS - Ĵaŭdo, 1 aprilo - Hamburg, Germanio.

INTERNACIA TAGO DE INFORMADO PRI AŬTISMO Vendredo, 2 aprilo - Prelegoj kaj prezentaĵoj en la tuta mondo.

POLIGLOTA KROZŜIPUMADO [POLYGLOT CRUISE] - 17 - 24 aprilo - Barcelono (Hispanio)

Poliglotoj vojaĝos per krozŝipo de Barcelono al Francio, Italio kaj Malto.

RB_HAMELN: 7-A KANTOPARADO - VOĈDONU POR LA KANTO DE LA TAGO! - merkredo, 21 aprilo. Hameln (Germanio) **KTP, KTP, KTP...**

KVAZAŬA FABELO

En ĉi tiuj tempoj, pro la tre bone konata kialo, malmultas la pozitivaj pensoj, ankaŭ pro la daŭra bombardado fare de ĵurnaloj, radioj, televidoj, kio malpermesas forgesi la malserenan situacion de ĉiuj spertatan. Restas nur do liberigi la menson de maltrankviligaj kaj katastrof-elvokaj anoncoj kaj sindediĉi al plej ŝatataj okupoj. Aŭ eĉ, kiel en ĉi lastaj monatoj ofte mi faris, klopodi meti iom da ordo en la malordo…

Kiom da forgesitaĵoj mi elfosis! Foje iuj konservindas, ĉar karmemoraj aŭ historie aŭ lingve interesaj; alifoje tute sensignifaj, forĵetendaj por rehavi iom pli da spaco en ŝrankoj kaj tirkestoj. Kiom da nekredeblaj kaj agrablaj surprizoj mi trovis! Unu el tiuj mi flankenmetis cele al kunmetado de artikolo, por miaj scivolemaj gelegantoj.

EL MALNOVA TIRKESTO titoliĝas rubriko de la revuo *Flandra Esperantisto* - marto 1948.

Odiseo de la "Marie Thèrése" en 1903

Konvinkita esperantisto en Parizo, s-ro Marius Vadel ekhavis la ideon farigi vojaĝon ĉirkaŭ la mondo al letero, redaktita en esperanto kaj adresita nur al esperantistoj. Post ricevo, tiuj ĉi ĝin ekspedis al adreso, indikita dorsflanke sur la folio, kiu portis ilian nomon. Tiu ĉi letero, kiun s-ro Vadel, laŭ la nomo de sia filino, nomis 'la Marie Thèrése'*, estis skribita sur tolo kaj, malfaldite, ĝi estis longa proskimume ses metrojn; faldite, ĝi nur havis la formaton de ordinara letero.*

Eskpedita en Parizo, la 20an de Aprilo 1903, 'la Marie Thèrése' *iris sinsekve al: Svislando, Belgujo, Anglujo, Hispanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Germanujo, Holando, Norvegujo, Svedujo, Finnlando, Bulgarujo, Ruslando, Polujo, Siberio, Japanujo, Usono, Kanado kaj reatingis Parizon, la 25an de Januaro 1904.*

Bedaŭrinde neniu alia informo pri tiu tola letero kaj ĝia enhavo, meritanta eniĝon en la *Guinness*-libron de Rekordoj[1)], estas trovebla. Multajn ĵurnalojn el la komencaj jaroj de la pasinta jarcento mi esploris, sed vane - nenia spuro pri ĝi. Tuthazarde kaj danke al amiko Jean-Pierre Ducloyer, mi eksciis iom pli pri ĉi kuriozaĵo kaj sukcese eniris la plej ĝustan cellokon: la Muzeon pri Poŝto en Parizo[2)].

Helpis min prezenti ĉi belan, realan fabelon la retrevuo *L'Adresse I.P.*

Letero kaj spirito de Esperanto

Tiu letero kunigas filinan amon kaj humanisman esperon. Unu jarcenton post eksterordinara vojaĝo ĝi atingis la muzeajn kolektojn. Jen la historio de letero, ekzemplo de alitempaj sentoj.

Tiu objekto, nekutima en la kolektoj de muzeo, estas kortuŝa aĵo, plena je profundaj sentoj, je fido al estonteco, je utopio…

La letero de Marius Vadel, kiu informas pri la naskiĝo de lia filino, pliriĉiĝas dum sia vojaĝo per la vortoj de proksimume dudek eminentaj E-movadanoj. Ĝi tamen estas nur letero kiu vojaĝis de unu urbo al alia, laŭ la indikoj de ĝia iniciatinto.

La unika historio de ĉi tola falditaĵo malkaŝiĝas komence de la 1990aj jaroj. Iun tagon maljuna sinjorino frapas je la pordo de la muzeo, kunportante skatoleton subbrake. Ene troviĝas letero kun koverto, medalo kaj kopio de la kovrilo de la revuo *Lecture pour tous* (Legaĵoj por ĉiuj).

"Mi estas 90-jara kaj ne havas posteulojn", ŝi deklaras al Pascal Roman, la muzea historiisto kiu bonvenigas ŝin. *"Mi deziras, ke tiuj ĉi memoraĵoj postvivu min kaj la Muzeo pri Poŝto ŝajnas al mi la ĝusta loko por ilin konservi."*



La maljunulino nomiĝas Marie-Thérèze Vadel kaj estas la filino de Marius Vadel, unu el la iniciatintoj de Esperanto en Francio. Kiam ŝi naskiĝas en 1903, ŝia patro, preskaŭ freneziĝinta pro la ĝojo, deziras, ke esperantistaj amikoj partoprenu en lia feliĉo. Tiucele li elpensas apartajn koverton kaj leteron. La letero estas el tolo, kiu dekobliĝos - same kiel la mezepokaj *Rotula*[3)] - sekve de la respondoj de la adresatoj. Tiu letero, balge faldita, estas ŝirmita dum la vojaĝo per pergamena koverto kun fenestro, tra kiu videblas la adreso de la sinsekvaj ricevontoj.

"La letero iras al 19 landoj, el kiuj Alĝerio, Finnlando, Irano, Portugalio, Rusio, ktp", Pascal Roman rakontas, *"kaj pro la aldonitaj mesaĝoj ĝi iĝas plurajn metrojn longa kaj surhavas la subskribojn de esperantistaj famuloj, el kiuj ankaŭ tiun de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la pola kuracisto, iniciatinto de la internacia lingvo".*



La altvalora letero reatingos sian sendinton la postan jaron kaj Marie-Thérèze konservis ĝin la tutan vivon, samkiel la medalon kun la figuro de Zamenhof kaj la kovrilon de la revuo de decembro 1906 kiu elvokas la vojaĝon de la letero. Ĉion ĉi ŝi deziras postlasi al la muzeo.

"Vivigu tiun leteron!", Marie-Thérèze diras aŭdiaŭante historiiston Pascal Roman. Ŝia peto estos plenumita, ĉar la muzeo plurfoje montris ĝin en ekspozicioj en Parizo kaj en la tuta lando. Kiam la muzeo remalfermiĝos, povas esti, ke ĝi estos montrita ene de la daŭraj kolektoj de la muzeo.

Pli ol eksterkutima vidaĵo, tio estos emociplena momento.


Verkis Rodolphe PAYS

✉ ✉ ✉ ✉ ✉ ✉

Kelkaj notoj:

1) El GUINNESS-LIBRO DE REKORDOJ RILATAJ AL ESPERANTO

• La kanto, kantita en la plej multaj lingvoj de ununura individuo, estas *Oraj Revoj de Gandhi* de d-ro Kesiraju Srinivas (Barato), kiu surbendigis la trakon en 125 malsamaj lingvoj kaj publikigis ĝin, kiel duoblan KD-albumon, titolitan *La Vojo de Mahatma Gandhi* je la 2ª de decembro 2009. Jen kelkaj el tiuj lingvoj: la bengala, kroata, dana, esperanta, fiĝia, greka, hebrea, itala, japana, kaŝmira, malaja, nepala, pola, rusa, sanskrita, uzbeka, vjetnama, zulua ...



• La rekordlibro listigas Esperanton kiel solan lingvon, kiu ne havas neregulajn verbojn.

• En la germanlingva eldono 1997 (aŭ 1998) troviĝas la esperantlingva poeto Jan Stanisław Skorupski, kiel aŭtoro de plej multaj sonetoj, verkitaj en la pola kaj Esperanto (2928 poemoj ene de du jaroj kaj duono!): mirige estas, ke ne temas pri sonetoj tradukitaj de la unua lingvo al la dua kaj inverse!!!

Jen kion li skribas en sia *Portalo de Plezuro:*

Aventurismo estas filozofio kun tempo kiel heroo de aventuro. Mi invitas Vin kore legi la interretan sonetlibron *SONETADO*.

Ĉiutage mi skribis pri ĉio, kio tagon post tago venis al mia kapo, pri la personoj konataj kaj malkonataj, pri grupoj da homoj, pri sociaj aferoj, pri fenomenoj de naturo, ankaŭ pri simplaj objektoj en la konteksto de ekzist-esploro, kaj ĉefe pri tio, kion mi mem travivis, farante kronikon de mia sperto.

Sufiĉas enskribi vorton sub la signo *Listo de la sonetoj*, por ekscii, en kiu soneto ĝi troviĝas.

Mi petas Vin pri indulgema pritrakto, eĉ se ne ĉiam ĉio okazos laŭ Via gusto. *Sonetado* estas sonetoj skribitaj tagtage sisteme ironie kaj kritikeme kun la etoso de pamfletoj.

[ndr: ĝin mi vizitis, legis kaj ... ŝatis!]

• Ankaŭ la esperantlingva muzikisto JoMo eniris la rekordlibron. En la eldono 2000 li registriĝis pri kantado en plej multaj lingvoj - li prezentis 22 kantojn en 22 lingvoj.

• Papera eldono de la libro (ĉ. 2005/2010) mencias, ke Esperanto estas unu el la tri plej facilaj lingvoj de la mondo.

• Prof. d-ro Boris Neubauer eminentas en la stenografa fako: li kapablas steni en pli ol 17 lingvoj, inter kiuj esperanto kaj interlingva.

2) *Musée de La Poste*, 34 Boulevard de Vaugirard, 75015 Paris

3) *Rotula* - longa kaj mallarĝa volvaĵo el papiruso aŭ pergameno, kun skribaĵo sur nur unu flanko.

ELDO



Radiaj Alirprogramoj RAI Uno

9 aprilo	14h50 - Memorante Lazaro Ludoviko ZAMENHOF
7 majo	14h50 - Pillole.0 di lingua internazionale esperanto
9 junio	14h50 - Esperanto en la literaturo originala kaj tradukita

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

en sekretaj anguloj de triesto

Sur fasado de unu el la lastaj domoj, en strato *Cisternone* n. 78, estas niĉo en kiu kuŝas busto de brutgardisto (dialekte: *mandrièr*). Probable el gipso, origine ĝi estis farbita*:* nigra estis la jako, blanka la papilia kravato kaj surkape *el caregon* [elp. karegòn], la tipa kapkovrilo de la brutgardistoj. La dommastro estas apogita kun krucitaj brakoj sur la fenestro-sojlo, ĉion ĉirkaŭan rigardanta kaj kontrolanta.



La posedanto de tiu domo, s-ro Skerl, jam de longe mortis, tial por iom ekscii pri ĝia origino oni devas fidi je la memoroj de la personoj vivantaj tiuloke. Sed la opinioj de la najbaroj inter si malakordas kaj do, nenio certas rilate la kialojn de la busto-starigo.



La domo nun ne plu estas loĝata, sed espereble baldaŭ prezentiĝos nova posedanto, kiu restrukturos la domon, riparos kaj refarbos la buston de la preskaŭ jarcenta figuro de la *omo col caregòn* [la viro kun la karegòn], redonante al li la longtempan rolon de kvartala gardisto.


Nun, koncize, ni vidu, kion signifas tiu *caregòn*. Ĝi estas vorto en la veneta dialekto, kiun tamen estas adoptita ankaŭ de triestanoj. Eĉ en geografio ĝi ĉeestas: en la norda parto de la veneta regiono, en la provinco de *Bellùno*. Popola legendo rakontas, ke la Eterna Patro laboradis intense, tagnokte, kreante kvar Dolomitajn montojn, kio Lin tiom lacigis, ke Li decidis starigi la lastan, nome monton *Pelmo*, por finfine iom ripozi kaj ankaŭ komforte admiri la rezulton de sia laboro kaj la belecojn de la montaro. Sed lia granda malamiko, Satano, kaŝita malantaŭ unu el tiuj montoj, Lin spionis, kun la celo trovi la manieron krei eĉ pli imponan montopinton.



Li ekamasigis rokojn, ŝtonojn kaj teron, sed malgraŭ lia strebado la materialo, amasigita ĥaose, daŭre falruiniĝis. Tre baldaŭ Satano estis elĉerpita de tiu penado, kies rezultoj lin des pli humiligis kaj eĉ estis pruvo de lia malsupereco. Per forta piedbato, plena je ĥolero, li rulfaligis gigantan ŝtonegon de la montosupro. Tero, supergrandaj ŝtonoj, arboj falegis laŭ la kruta deklivo ĝis atingo de Valo *d'Oten* kun surdiga bruego. La bona Dio skuis la kapon, amarece. Longe kaj medite Li admiris la emocian spektaklon de la rozkoloriĝo, kiu pentras purpurnuance la montopintojn; post tio Li leviĝis de sia *Karegòn* kaj malaperis.

De tiam monto *Pelmo* ricevis la nomon de 'trono de Eterna Patro', en la veneta dialekto, *Caregón de 'l Pareterno*. **ElDo**





Fonto: Ridejo.ikso.net de E@I

il Postalista
Rivista on line di cultura filatelica e storico postale
Iscrizione Tribunale di Arezzo n. 1326/04 del 28 settembre 2004
Direttore responsabile: Roberto MONTICINI

Martedì 19 gennaio, è iniziata una nuova rubrica: **Esperanto en la Filatelo**, in collaborazione con Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AREK)

il primo articolo: **Esperanto? Kio ĝi estas?** Non disperate, gli articoli sono anche tradotti in italiano: **Esperanto? Che cos'è?** così come la pagina degli articoli: **L'Esperanto nella Filatelia**. Questo darà modo, per chi non conosce l'esperanto, ma si dimostra curioso, di approcciare e magari iniziare a studiare questa lingua internazionale.

ESPERANTO KAJ FILATELO

Je la 19ª de januaro 2021 ELF-AREK - Esperanto-Ligo Filatelista kaj Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj komencis sian kunlaboron kun la reta revuo IL POSTALISTA, per artikoloj kaj prezentadoj pri Esperanto kaj pri la longtempa historio liganta la lingvon kaj kolektadon.

Ĉio komenciĝis danke al mesaĝo de d-ro Antonio de Salvo, per kiu li invitis min legi interesan artikolon verkitan de Veselko Guštin pri **La poŝtmarkoj TLT-VUJA 300 din, 38ª Universala Kongreso de Esperanto 1953**, kiun, havinte permeson ĝin traduki al esperanto, mi publikigis poste en la organo de ELF-AREK *La Verda Lupeo*. Sekve de tio surprize la responsa direktoro Roberto Monticini afable petis min, kiel prezidanton de la Ligo filatelista, aperigi en lia retejo artikolojn pri Esperanto lige kun Filatelo. Entuziasme la redaktanta skipo akceptis tiun ĉi tre signifan proponon kaj aldoniĝis tre volonte al la grupo, kiel artikolisto, la konata filatelisto Alessandro Bellucci.

Ĉiumonate aperas dulingva artikolo, temanta pri la lingvo en ĝiaj diversaj aspektoj lige kun Filatelo. Ĝis nun estas legeblaj tri.

Vizitu nin ĉe https://www.ilpostalista.it/ kaj https://kolektado.esperanto.cc/

Koran dankon al Norberto Saletti, redaktanto de NSIR - Nova Sento in Rete (N. 1076 - 76/2020), kiu haste donis informon pri ĉi tiu novaĵo!

Elda DOERFLER


pagina iniziale | le rubriche | storia postale | filatelia

in collaborazione con: Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AREK)

Indice degli articoli

la artikolo en Esperanta versio

Esperanto? Che cos'è?

Alessandro Bellucci

Esperanto è la lingua internazionale neutrale proposta nel 1887 dal medico e poliglotta ebreo Lazzaro Ludovico Zamenhof, vissuto nella parte occidentale dell'Impero zarista (oggi Polonia).

Ungheria 1957

Zamenhof creò una lingua di facile apprendimento, regolare, con la speranza che essa venisse poi accolta come seconda lingua per tutti i popoli, rendendo così possibile una comunicazione diretta. L'ortografia è fonetica (un suono = una lettera), la grammatica è regolare e priva di eccezioni. La pronuncia, basata sulle cinque vocali fondamentali, è semplice e chiara.

LA VERDA LUPEO

INFORMILO de ELF/AREK

Decembro 2020 (52a jaro) N-ro 185

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen
Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste
James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP

Bonan Novan Jaron

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2020 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina ODV

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina ODV 90012340320